

BULTENO

GERMANA
ESPERANTA
FERVOJISTA
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung
deutscher Eisenbahner-Esperantisten



Fondita 1952

Numero 6

Novembro/Decembro 1967

Eta postrikolto pri la 19a IFEF-Kongreso en Fulda

Post kiam la du antaŭaj numeroj de „Bulteno“ jam raportis pri la plej gravaj okazintaĵoj de la kongreso, ni intencas fini la raportadon per ĉi tiu „postrikolto“, kiu rondigu la bildon pri tiu nia plej grava internacia jararango. Ni limigos nin je tio, kio ne jam aliloke estas dirita aŭ kio ankoraŭ bezonas specialan mencion.

Pro tio ni komencu antaŭ la kongreso, substrekante la fakton, ke la kongreslibro ne nur laŭplane povis esti pretigita kaj presita, sed ankaŭ forsendita al ĉiuj, kiuj sufiĉe frue aliĝis. Tio de jaroj okazis. Ni sukcesis interesigi plurajn porfervojistajn asekur-entreprenojn, sindikatojn k. a. reklami en la kongreslibro, bonvena financelo, sekve imitinda por ĉiu LKK. Sur la kongresinsigno la unuan fojon en IFEF-kongreso ni indikis nomon kaj landon de la resp. kongresano. Pri tio ni aŭdis multajn agnoskajn vortojn, ĉar tiel la reciprokaj kontaktoj estas plifaciligitaj. Komikaĵo same okazinta antaŭ la kongreso estis, ke po unu franca, svisa, kanada kaj germana tradukcentrepreno ofertis al LKK siajn simultanaparatojn.

Ni substreku ĉi tie, ke la bankedo estis vera bankedo, nome solena, komuna manĝado kun diversaj tablo-alparoladoj flanke de eminentaj gastoj. Bedaŭrinde estis, ke kelkaj banked-partoprenantoj ne komprenis ĉi tiun solenaĵon, ekz. forŝanĝante la slipoj de la tablo-ordo aŭ venante preskaŭ du horojn post komenco.

Kleine Nachlese zum 19. IFEF-Kongreß in Fulda

Nachdem die beiden vorhergehenden Nummern des „Bulteno“ bereits über die wichtigsten Ereignisse des Kongresses berichtet haben, möchten wir die Berichterstattung mit dieser kleinen Nachlese beenden, die das Bild über diese, unsere wichtigste internationale Jahresveranstaltung abrunden möge. Wir wollen uns auf das beschränken, was nicht schon anderswo gesagt ist oder was nochmals besonderer Erwähnung bedarf. Lassen Sie uns deshalb vor dem Kongreß beginnen und die Tatsache unterstreichen, daß das Kongreßbuch nicht nur planmäßig fertiggestellt und gedruckt, sondern auch allen Teilnehmern zugesandt werden konnte, die sich rechtzeitig angemeldet hatten. Dies war schon seit Jahren nicht geschehen. Wir konnten mehrere Eisenbahner-Versicherungen, -Gewerkschaften u. a. dafür gewinnen, im Kongreßbuch zu werben, eine willkommene Hilfe und daher für jeden Kongreßausschuß nachahmenswert. Zum ersten Male aus Anlaß eines IFEF-Kongresses haben wir auf dem Kongreßabzeichen Namen und Land des betr. Teilnehmers angegeben. Wir haben darüber viele anerkennende Worte gehört, wurden doch hierdurch die gegenseitigen Kontakte erleichtert. Es entbehrt nicht der Komik, daß vor dem Kongreß je ein französisches, schweizerisches, kanadisches und deutsches Übersetzungsunternehmen dem Kongreßausschuß seine Simultanapparate anbot.

Neniam ĝis nun la kontakto al la loka enloĝantaro kaj speciale al la fervojistaro estis tiom intense flegita kiom en Fulda. Ĉi-riilate ni akcentu, ke helpe de aŝiĝoj, kiuj tutan semajnon pendis en ĉiuj fervojaj aŭtobusoj en Fulda kaj ĉirkaŭaĵo, helpe de flagoj kaj transparentoj, helpe de altvalora, multe frekventita ekspozicio kaj du publikaj stratnomoj, helpe de du fakaj vizitoj en la fervoja riparejo kaj per granda distra vespero komune kun la lokaj fervojistoj kaj ties familioj, helpe de futbalmaĉo kaj ne laste helpe de la gazetaro ni trovis eksterordinare vastan eĥon ĉe la publiko.

Precipe la loka gazetaro abunde informis sin kaj jam longe antaŭ la kongreso kaj ĉiutage dum ĝi ofte detale kaj kun multaj bildoj informis la publikon en tre agrabla kaj favora maniero. Ni subtenis tion per gazetar-konferenco antaŭ kaj speciala inform-servo dum la kongreso, krome per trifoje aperinta propra kongresinformilo. Entute LKK kolektis ĝis nun pli ol 160 artikolojn kaj pli longajn notojn pri la kongreso en la fervojista, taga-kaj Esperantogazetaro, inter ili 54 antaŭ, 50 dum, la reston post la kongreso, certe kontentiga rezulto. Ne kontentigaj kaj kvazaŭ nulaj estis la reagoj de radio kaj televido spite al niaj klopodoj. Ankaŭ kun bedaŭro devas esti registrata ke, kvankam temis pri internacia kongreso kun partoprenantoj el 20 landoj kaj kontraŭe al la 4a IFEF-kongreso en Lindau, unu el la 4 altaj protektantoj, nome la DB-estraro kaj same la ĉefadministracio ne sendis proprajn reprezentantojn.

Dank' al la supre menciitaj faktoj la 19a IFEF-kongreso sukcesis trapenetri la „brilan izoladon“ de la esperantistoj, almenaŭ en Fulda. Tamen ekzistis kongresanoj, kiuj mallaŭdis ekzemple la relative multnombrajn alparolojn. Sed ĉu oni vere opinias, ke la esperantistoj povus interesiĝi altranĝajn personojn por la Internacia Lingvo, sen minimume doni al ili okazon, aŭskulti ĝin kaj eĉ mem okupi pri ĝi? Ni male estu kontentaj pri ĉiu favorulo, kiu alparolas nin en nia lingvo, precipe se li estas neesperantisto.

Sajnas al ni, ke neniu persono estas pli kompetenta doni finjuĝon pri la kongreso de Fulda ol la IFEF-prezidanto mem, s-ro de Jong, kiu de preskaŭ 20 jaroj laboras en la IFEF-estraro. Ni vortvorte ĉitas karakterizajn eldirojn el lia fermparolado (12.5.67) jen nur en Esperanto, ĉar germanlingva ekstrakto jam aperis en Bulteno 4/67. Per liaj vortoj la raportado finiĝu.

Wir wollen hier betonen, daß das Bankett wirklich ein Bankett war, nämlich ein feierliches, gemeinsames Festessen mit mehreren Tischreden besonders lieber Gäste. Bedauerlich nur, daß einige der Teilnehmer dies nicht recht verstanden, indem sie z. B. die Tischkarten vertauschten oder fast 2 Stunden zu spät kamen.

Niemals bisher wurden die Kontakte zur örtlichen Bevölkerung und besonders zu den Eisenbahnern so intensiv gepflegt wie in Fulda. In diesem Zusammenhang soll betont werden, daß wir mit Plakaten, die eine ganze Woche hindurch in allen Bundesbahn-Omnibussen in Fulda und Umgebung aushingen, mit Fahnen und Spruchbändern, mit einer hochwertigen und stark besuchten Ausstellung, mit 2 öffentlichen Straßenbenennungen, mit 2 fachlichen Besichtigungen im Bundesbahn-Ausbesserungswerk, mit einem großen Bunten Abend gemeinsam mit den örtlichen Eisenbahnern und deren Familien, mit einem Fußballspiel und nicht zuletzt mit Hilfe der Presse ein außerordentlich starkes Echo in der Öffentlichkeit fanden.

Besonders die örtliche Presse informierte sich eingehend. Schon lange vor dem Kongreß und täglich während der Kongreßtage unterrichtete sie die Öffentlichkeit oft bis ins Detail mit vielen Bildern und in sehr freundlicher Weise. Wir unterstützten dies durch eine Pressebesprechung vor Beginn und einen besonderen Informationsdienst während des Kongresses, außerdem durch eine eigene, dreimal herausgebrachte Kongreßzeitung. Insgesamt hat der Kongreßausschuß bisher mehr als 160 Artikel und Pressenotizen über den Kongreß in der Eisenbahner-, Tages- und Esperantopresse festgestellt, darunter 54 vor, 50 während und den Rest nach der Kongreßwoche, bestimmt ein recht zufriedenstellendes Ergebnis. Nicht befriedigend und gewissermaßen gleich Null war trotz unserer Bemühungen die Reaktion von Rundfunk und Fernsehen. Mit Bedauern bleibt auch festzustellen, daß, obwohl es sich um einen internationalen Kongreß mit Teilnehmern aus 20 Ländern handelte (im Gegensatz zum 4. IFEF-Kongreß in Lindau), einer der 4 hohen Schutzherrn, nämlich der Vorstand der DB, wie auch die Hauptverwaltung, keinen eigenen Vertreter entsandten.

Dank der oben erwähnten Tatsachen gelang es dem 19. IFEF-Kongreß, die „Splendid isolation“ der Esperantisten zumindest in Fulda zu durchbrechen. Trotzdem gab es Kongreßteilnehmer, die beispielsweise die

verhältnismäßig große Anzahl von Ansprachen kritisierten. Aber glaubt man denn wirklich, daß die Esperantisten wichtige Persönlichkeiten für die Internationale Sprache interessieren könnten, ohne ihnen Gelegenheit zu geben, sie zu hören oder sich sogar selbst mit ihr zu beschäftigen? Wollen wir uns im Gegenteil über jeden freuen, der uns in unserer Sprache anspricht, besonders wenn er Nichtesperantist ist.

Wir meinen, daß niemand kompetenter ist, ein abschließendes Urteil über den Fuldaer Kongreß abzugeben, als der IFEF-Präsident selbst, Herr de Jong, der seit fast 20 Jahren im IFEF-Vorstand mitarbeitet. Wir zitieren wörtlich charakteristische Teile seiner Schlußansprache vom 12. 5. 67, jedoch nur in Esperanto, da ein deutschsprachiger Auszug bereits im Bulteno 4/67 erschienen ist.

LKK/P.

Kongresferma parolado de IFEF-predidanto, s-ro de Jong

Karaj amikoj,

kiel s-ro Gimelli esprimis la dankon de la italaj partoprenantoj el ĉi tiu kongreso, mi deziras tion fari en la nomo de la tuta partoprenantaro. Bedaŭrinde, ni denove atingas la finon de bela, de belega semajno. Ni travivis belajn, belegajn momentojn, kaj mi aŭdis ĉiam denove la ĝojigajn vortojn „kian belan tagon ni travivis hodiaŭ!”

Estas mirinde la organizado de ĉi tiu kongreso. Estas mirinde kaj admirinde la laboro, kiun kapablis fari la organizantoj. Kiam oni konsideras, ke ĝuste dum la organizado multaj el la organizantoj kapablis entrepreni ankoraŭ kromajn laborojn kiel la traduko de la KONVENCIO pri la pasaĝertrafiko, ke tiom da poemoj estis tradukitaj kaj eĉ faritaj de la prezidanto de ĉi tiu Kongresna Komitato, tiam mi povas diri: estas ne kompreneble, ke homoj povas fari tiom da laboro, por doni ĝuon al aliaj. Tamen ni spertis tion, kaj ĉiuj el vi scias, kiom bele aranĝiĝis ĉio. Se ni pripensas, kio okazis dum ĉi tiu fakte mallonga semajno, kiom okazis en tiu semajno, tiam oni preskaŭ povas diri, ke cio estas nekomprenebla!

Mi notis kelkajn eventojn kaj mi estas certa, ĉar mi

parkere faris tion, ke mi ne povas esti tute kompleta, kvankam ĝi estas longa, tre longa listo. Se ni pensas pri la malfermo, al kiu partoprenis gravaj personoj de la fervojo kaj de urbaj instancoj, gvidantoj de sindikatoj kaj gvidantoj de Esperanto-Organizoj, se ni pripensas la honorigon de la tri IFEF-membroj per la prezidanto de FISAIC, se ni pensas pri la inaŭguro de Esperantostratoj en Fulda kaj en Hilders, se ni pensas pri la teatraj prezentadoj, se ni pensas pri aliaj distraj vesperoj kaj dancado, tiam mi estas certa, ke ĉi tiu kongreso en Fulda restas en via memoro dum tre longa tempo.

Okazis krom tio du altnivelaj fakprelegoj kun abundaj tekstoj, bildoj kaj diapositivaj, okazis akcepto ĉe la urbestro de Fulda kaj akcepto ĉe urbaj instancoj en Rothenburg, Uffenheim kaj Hilders. Tre koran akcepton ni spertis en la vagonriparejo en Fulda, ĝeneralan interesiĝon de la loka gazetaro ni spertis per la ĉeesto de ĵurnalistoj kaj per multaj artikoloj en la loka gazetaro. Okazis eldono de ĉiutaga kongresgazeto, eldono de la esperantlingva traduko de la Konvencio pri pasaĝertrafiko, okazis futbalmaĉo, mirinde bone sukcesis la prezentado de la uniformoj. Ĝi

estis ankaŭ dum la inaŭguro de la Esperantostrato vere belega spektaklo.

Okazis 4 kunsidoj de IFEF-estraro kaj Komitato, kunsidoj kiuj estis kelkfoje iom malfacilaj kaj kiuj certe estis lacigaj. Okazis unu plena kunsido, okazis kunsidoj de la fakprelega kaj terminara komisionoj, okazis kelkaj elektoj pri la Komitato. Ni elektis ankaŭ novan ĉefkomitatanon kaj Komitatanon A por UEA.

Ankoraŭ kuŝas en freŝa memoro la bela ekskurso de hodiaŭ kaj la belega ekskurso, kiun ni faris al Rothenburg kaj al Uffenheim. Ni travivis tiom multe, ke preskaŭ oni ne povas tuj memori, kion oni faris. Per malmultaj vortoj: la aranĝoj en ĉi tiu kongreso estis tiom perfekte aranĝitaj, ke oni povas diri, ke nia kongreso ne estis bela, sed belega kongreso, belega belega kongreso kaj tion ĉiam ripetis al mi multaj partoprenantoj, kiuj post ekskursoj venis al mi, dirante „kian belan tagon ni havis hodiaŭ!”

Mi kredas, ke post la kongreso vi havu iom da ripozo, sed post tiu ripozado ŝajnas al mi, ke en ĉiuj niaj urboj estos sufiĉe por fari. Ne lasu ĉion al viaj estraranoj kaj al viaj gvidantoj. Petu de

tempo al tempo „ĉu mi povas helpi al vi“, faru de tempo al tempo iun iniciativon aŭ iun sugeston, ĉar se ni ĉiuj restas ripozantaj dum tuta jaro ĝis Varna, tiam mi timas, ke post kelkaj jaroj nia Esperanto-movado tute neniĝis kaj ke ni povas ĉesi la tutan aferon. Por resti staranta, ni bezonas kunlaboron de multaj, de homoj, kiuj povas kaj kapablas disponi iom da tempo kaj kiuj kapablas ankaŭ fari ion por nia movado.

Ni jam tiom kutimiĝis al Esperanto, ke ĝi estas por ni tutsimpla afero, sed tamen vi devas konfesi kaj kompreni, ke ĝi estas miraklo. Kaj estas miraklo, ke ni kun 20 nacioj povas tiom libere interrilati, ĝi estas ekzemplodona afero en la mondo! Ĝi estas granda donaco al la mondo kaj fakte estas nekompreneble, ke ankoraŭ oni ne deziras akcepti tion, kion oni povas ĉiam denove vidi en niaj kongresoj. Oni ja po-

vas vidi, kiom bone funkcias tiu lingvo.

Estimataj amikoj, mi ne volas tro longe tedi vin per miaj predikoj. Ni travivis belegan semajnon. Estis homoj, kiu laboregis por ni, por prepari al ni ĉi tiun semajnon. Mi en la daŭro de ĉi tiu semajno esprimis al diversaj instancoj eble 50 dankvortojn, 50 foje mi dankis al tiu, al tiu, al tiu, eble mi troigas, sed tio ne gravas. Mi tamen kredas, ke mi devus en ĉi tiu kongreso esprimi mil dankojn kaj la ceterajn 950 mi devus direkti al la membroj de la Loka Kongresa Komitato (aplaŭdo ...). Ili bonege, pli ol bonege — mi ne trovas vortojn por tio — ili laboris kaj ĝojiga fakto estas, ke ni povis konstati, ke en nia IFEF-movado troviĝas la fortoj, kiuj estas pli ol kapablaj transpreni en la venonta jaro la gvidadon super nia movado. Vi eble scias, ke en la venonta jaro almenaŭ la prezidanto kaj

sendube verŝajne ankaŭ la ceteraj estraranoj nunaj diŝiĝos de siaj postenoj kaj ke en la kongreso de Varna ni devos elekti novan estraron por IFEF. Kaj vi ankaŭ vidis, ke laŭ kapableco, laŭ kiu la laboro estas farita, ke en nia movado troviĝas homoj pli ol kapablaj por transpreni tiun taskon. Ni do ne bezonas timi kiel ni antaŭe faris, ke post la foriro de la nuna estraro IFEF estos en danĝero. Mi en ĉi tiu semajno konvinkiĝis ke la ekzistado de IFEF tute ne estas en danĝero. Por fini mi volas esprimi mian koregan dankon al la LKK. Mi ne scias, kiun el ili mi devas pli laŭdi, kaj ili estas unu komunumo. Tio ankaŭ ne estas necesa, ĉar vortoj mankas por tiu afero. Mi ne povas pli fari ol al tiu LKK esprimi en via nomo tutkoran kaj tutkoran dankon por ĉi tiu belega kongreso. (aplaŭdo ...). Kaj per tiuj vortoj mi fermas nian 19an!

Übersetzung eines kleinen Gedichts, das zur Benennung der „Esperantostraße“ am 8. Mai 1967 in Fulda anlässlich des 19. IFEF-Kongresses vorgetragen wurde.

- | | |
|---|--|
| <p>1. Viel Hunderte Menschen, sie kamen
voll Freude
von Osten und Westen, von Süd und
von Nord,
von Bergen und Tälern, aus manch
fernem Ort,
gemeinsam und festlich zu feiern
hier heute.</p> <p>2. Vor kurzem erst ist die Entscheidung
gefallen,
beschlossen die Stadtväter Fuldas
im Rat,
zu taufen ganz neu eine Straße
der Stadt,
zur Ehre des IFEF-Kongresses vor
allen.</p> <p>3. Acht Jahre zuvor hat die Fuldaer
Gruppe
das Ziel angesteuert mit all ihrer
Kraft.
Es kam keine Antwort, sie hat's nicht
geschafft,
und gänzlich versalzen schien damals
die Suppe.</p> | <p>4. Doch bald wurde wieder ein Angriff
gefahren,
dazu wurde noch eine Liste gesellt
mit Zamenhofstraßen, die's gab auf
der Welt.
Doch keineswegs kam in Bewegung
der Karren.</p> <p>5. Bis schließlich man las in der Fuldaer
Presse:
Benennt doch nun bald eine Straße
der Stadt.
Und jetzt funktionierte tatsächlich der
Draht,
denn brieflich bekundet die Stadt
ihr Int'resse.</p> <p>6. Sie schrieb, Esperanto, das sei eine
Sache,
wohl wert einer Straße inmitten der
Stadt.
Das müsse durchdenken der löbliche
Rat,
eh' er sich an eine Entscheidung
ranmache.</p> |
|---|--|

7. Nach Jahren begannen wir
 vorzubereiten
 den Fulda-Kongreß mit gewohntem
 Elan.
 Sofort gingen neu wir die
 Stadtväter an
 und baten sie, nunmehr mit Gunst
 zu entscheiden.
8. Sehr gut hat die Stadt ihre Wahl
 nun getroffen,
 wofür ihr ein herzlicher Dank sei
 gesagt.
 Gewinnen wird immer, wer auch
 etwas wagt,
 die Straße nicht besser wir konnten
 erhoffen.
9. Denn tags und auch nächtlich dort
 Tausende gehen.
 Das Wort „Esperanto“ prangt hoch auf
 dem Schild.
 Vom Dasein der Weltsprache gibt es
 ein Bild,
 und wie trotz der Grenzen sich alle
 verstehen.
10. Berühmt wird die Straße in fünf
 Kontinenten,
 denn täglich bringt nunmehr von
 Briefen 'nen Berg
 die Post in die Straße am Aus-
 bess'runqswerk,
- die Briefe, die Menschen aus aller
 Welt senden.
11. Gar würdig setzt fort man bewußt
 Traditionen,
 ehrt Wirken und Werk und Gedanken
 und Kraft
 des Menschen, der zeitlebens nur hat
 geschafft,
 der Menschheit zu dienen für
 Generationen.
12. Drum wenn nun den Namen der Straße
 wir sehen,
 das Schild „Esperanto“, dann sei dies
 ein Ruf,
 zu handeln wie jener, der einstmals
 dies schuf,
 zum Segen der Menschen woll'n wir
 mit ihm gehen.
13. So mögen sich denn diese Wünsche
 erfüllen,
 ein Meilenstein werde die heutige Tat!
 Von Herzen gedankt sei dem Rate
 der Stadt —
 Das Straßenschild laßt uns nun festlich
 enthüllen!
- Original in Esperanto verfaßt und ins Deut-
 sche übertragen von
 Joachim Giessner, Herzberg (Harz)
 Esperantlingve en LIF n-ro 4/67 paĝo 72

Zusammenfassung zum Fachvortrag

Schriftliche Weisungen an Züge und Ersatzverfahren

original in Esperanto verfaßt von Joachim Giessner, Herzberg, vorgetragen am 9. Mai in Fulda anläßlich des 19. Internationalen Eisenbahner-Esperanto-Kongresses. 1967

Verkehrssignale, die in aller Welt für Verkehrsmittel jeder Art angewendet werden, haben eine besondere Bedeutung für die Eisenbahnen und tragen wesentlich dazu bei, deren Sicherheit zu garantieren. Dieser Vortrag behandelt und vergleicht Verfahren aus 11 europäischen Ländern, auf Grund deren Züge an gestörten oder Halt zeigenden Hauptsignalen vorüberfahren dürfen. Dies wird ermöglicht durch schriftliche Weisungen auf Vordrucken, die man „Befehle“ nennt. Derartige Befehle gibt es in allen Ländern in verschiedenen Formaten und Farben.

Grundsätzlich sind die Fahrdienstleiter dafür zuständig,

Weisungen an Züge zu schreiben, zu unterschreiben und auszuhändigen. Unter gewissen Umständen ist es jedoch erlaubt, daß der Fahrdienstleiter einen Befehl einem anderen Mitarbeiter seines Bahnhofs oder telefonisch dem Zugpersonal diktiert. Ein Befehl darf erst dann übergeben werden, nachdem bestimmte Vorbedingungen hinsichtlich der betrieblichen Sicherheit erfüllt sind. In manchen Ländern behält der die Weisung erteilende Bahnhof die Urschrift für sich zurück, in andern Ländern eine Durchschrift oder auch gar nichts. Nicht überall muß das Zugpersonal den Empfang bestätigen, genau so wie nicht bei

allen Bahnen die übergebenen Befehle in den Bahnhöfen registriert werden.

Gewöhnlich werden Befehle den Zügen in dem betreffenden Bahnhof oder an dessen Einfahrsignal ausgehändigt. Jedoch ergibt sich öfter die Notwendigkeit, Weisungen schon mehr oder minder weit vor dem Punkt zu erteilen, den die Anordnung betrifft. Diese Methode setzt voraus, daß dem Fahrdienstleiter, der für das Ereignis zuständig ist, die Aushändigung des Befehls bestätigt wird.

Dies geschieht meist telefonisch. Unter gewissen Bedingungen dürfen Züge an

gestörten Hauptsignalen auch auf mündliche Weisung vorbeifahren.

Außer den schriftlichen Befehlen gibt es Ersatzverfahren mit dem gleichen Ziel. So gibt man in vielen Ländern allgemeine Mitteilungen über vorher bekannte Geschwindigkeitsbegrenzungen (bei der Deutschen Bundesbahn die „La“) heraus. Sie machen in den meisten Fällen das Ertei-

len schriftlicher Weisungen überflüssig, was viel Zeit und Geld erspart. Die meisten Bahnen wenden außerdem Ersatzsignale an, die zwar überall verschieden aussehen, aber sämtlich den gleichen Zweck haben: sie sollen dem Zug den Auftrag geben, an einem gestörten Hauptsignal vorbeizufahren, ohne daß eine schriftliche Weisung erteilt werden oder ein Eisen-

bahner örtlich anwesend sein muß, ja oft sogar ohne daß der Zug zu halten braucht. Die modernsten Anlagen lassen es zu, daß auf ferngesteuerten Strecken der Strecken-Fahrdienstleiter allein auf der Strecke befindlichen Zügen alle notwendigen Befehle gibt (telefonisch). Er fernbedient auch alle Ersatzsignale (Beispiel Strecke Nürnberg - Regensburg = 100 km).

11a jarkunveno de GEFA

Sen multe da bruo okazis la 11a jarkunveno la 21/22an de oktobro en la favore situanta hejmo de GdED en **Königstein (Taunus)**. Bela vetero kiel kutime favorigis la kunvenon. Temis ĉi-jare ĉefe pri kunveno de la estraro kun la komisiitoj por specialaj taskoj kaj la distriktkomisiitoj. Sabaton posttagmeze oni pritraktis en laborkunsido multspecajn problemojn. Post konciza raporto pri la 19a IFEF-kongreso flanke de la GEFA-prezidanto estas priparolita longa tagordo, el kiu ni menciu la sekvantajn punktojn. Krome bonvolu priatenti la **jarraporton** en ĉi tiu numero (paĝo 7).

La IFEF-estraro sciigis al la ĉefkomitatano Greutert (Svisio), ke ĝi komplete demisios en 1968. El tio rezultiĝos, ke eble la germana landa asocio devos partopreni en la estraro, kies konsekvenco estus ŝanĝoj en la germana estraro. Post kiam la faktoj fariĝos evidentaj en Varna, oni devos trovi solvon por la gvidaj personoj en nia propra asocio. Kompreneble jam nun ni cerbumas pri tio, por ne esti neapararitaj.

Ĉiuj de GEFA **kolektitaj revuoj** ekde nun estos prunteprenablaj ĉe s-ro Rösemann, Zugleitung Osnabrück (945/822/1131). Liston de tiuj revuoj ni publikos en venonta Bulteno.

La **redaktoro de Bulteno** denove petas ĉiujn grupojn kaj izolulojn, raporti al li pri novaĵoj senprokraste kaj anonci planitajn aranĝaĵojn **tiom frue**, ke li ankoraŭ havas tempon preni ilin en la Bultenon. „Bulteno“ estu fidela spegulo de nia asocia vivo.

Estas intencite, aktualigi la konatan **dia-varbserion** de GEFA. Bonvolu sendi al s-ro Ritterspach, Tarifamt Frankfurt/M, tipajn kolordiapozitivojn el la **vivo**

de GEFA kaj IFEF kun aŭ sen personoj kaj (nur plej brilajn) dia-ojn pri pejzaĝoj kaj konataj urboj konekse al kongresoj ktp. Vi ricevos viajn dia-ojn post esploro aŭ kopiigo. Same ni petas ĉiujn membrojn sendi nigreblankajn fotografajojn — ankaŭ la plej malnovajn — al s-ino Kruse, Sozialamt Frankfurt/M. Ni bezonas ilin por dokumenta albumo. Negativojn vi ricevos, bildojn (ple eble 7.5 oble 10.5 cm) ni pagos.

Ne forgesu aĉeti la **terminareton** germana-esperanta kaj esp./germ. Prezo 6.50 GM, ricevebla ĉe s-ro Ritterspach (Basa 955/2239). Vi nepre bezonas ĝin por bone kompreni fakajn artikolojn kaj alktumiĝi al la fervojista lingvo. Krome ĝi estas bonvena donacaĵo.

La **12a jarkunveno** verŝajne okazos en Augsburg la 19/20an de oktobro 1968.

La 13an jarkunvenon jam invitis la distrikto Mainz al Neustadt/Weinstraße. Vespere s-ro Ritterspach ĝojigis la ĉeestantojn per belegaj dia-oj pri la kongreso de Fulda kune kun ekstraktoj el la sonbendoj de la kongreso.

Poste la filo de nia distriktkomisiito de Saarbrücken, s-ro Reinhard Haupenthal, lerte kaj elokvente gvidis tra la okdekjara evoluo de Esperanto kaj montris vojojn al pli celtrafa agado de la esperantistoj. Kuragiĝe por la jam pli aĝaj adeptoj de la Internacia Lingvo, aŭdi tiujn konstruajn ideojn de jam vaste konata en la movado junulo.

Restis ankoraŭ kelkaj horoj, por gemute kunsidi kaj antaŭ ĉio komune kanti akompanitaj de du gitaroj. Entute belega vespero.

Dimanĉo antaŭtagmeze okazis aŭtobusveturado al la famkonata romania kastelo Saalburg kaj al Granda Feldberg kun duonhora migrado tra la belege kolorigitaj arbaroj. Tro rapide venis la posttagmezo kun la adiaŭo. **Gi**

Jarraporto pri la tempo de la 10a jarkunveno en oktobro 1966 ĝis oktobro 1967

La 12 monatoj, kiuj pasis de kiam ni festis la 10an jarkunvenon en Uelzen, komplete estas ombrumitaj de la 19a IFEF-kongreso. Multaj funkcioj de GEFA devis koncentrigi ĉiujn siajn fortojn, por ke la kongreso fariĝu sukcesa. Ankorau nun la postlaboroj ne finiĝis. Nepre estas necesa ioma paŭzado aŭ almenaŭ redukto de taskoj. Pro tio jam lastan jaron la estraro decidis, en 1967 ne okazigi kutiman jarkunvenon, sed anstataŭi ĝin per laborkunsido kun la distrikt-komisiitoj, kiu okazis la 21./22an de oktobro en Königstein/Taunus (komp. raporton sur paĝo 6 de ĉi tiu Bulteno).

Sed ankaŭ ĉi-jare ne manku la kutima jarraporto, kiu tamen ne ripetu jam alialoke diritajn faktojn. Ĉefa raportpunkto estas la **19a IFEF-kongreso**, kiun GEFA organizis en Fulda la 6an ĝis 12an de majo 1967. La Bultenoj 4 kaj 5/67 kaj ankaŭ ĉi tiu numero sufiĉe amplekse raportis pri tiu plej grava kaj brila aranĝaĝo de 1967.

La kongreso certe restos en la historio de IFEF kiel unu el la plej bone organizitaj, riĉaj laŭ programeroj, plej brile sukcesintaj. Tio okazis, kvankam aliĝis multe malpli da kongresanoj ol atendite kaj spite al la nekredible retenema sintenado ĝuste de niaj germanaj membroj. Nur $\frac{1}{5}$ de la germana membraro estis aliĝinta, apenaŭ pli ol por jarkunveno. Sed ekzistis aliaj, kiuj provis profiti almenaŭ unuopajn kongrestagojn sen aliĝo kaj sen kotizo. Ĉu ie ekzistas LKK, kiu kapablas oferti valoran programon al siaj gastoj sen mono? Sendube nenie. Ke LKK tamen kapablis fari tion, unuflanke dependis de ĝiaj ideoj havigi al si la necesajn rimedojn. Sed ni kaptu ĉi tiun okazon ankaŭ kore danki i. a. al niaj tri fervojistaj sindikatoj, kiuj senhezite subtenis nin. Aliaflanke ni danku al la ĉefestraro de BSW, kiu grave kontribuis al la trankviliga sento, ke ni ne bezonis timi tro grandan deficiton.

Jen estu menciata fakto, kiu verŝajne ne sufiĉe klare estas rimarkita de la kongresvizitantoj, nome la en Fulda de GEFA prezentita traduko de la „Internacia Konvencio pri la Pasaĝer- kaj Frajttrafiko“. Ĝi estas, prizorgita de kolego Barnickel, unu el la plej gravaj fakaj eventoj de la jaro. Estus dezirinde, ke multaj el niaj legantoj havigus ĝin al si, uzante ĝin kiel taŭgegan demonstrobjekton. Tion same valoras la du fakprelegoj, kiuj i. a. taugas por esti prezentataj en germana lingvo antaŭ fervojistoj ĉiuspecaj. Fine ni pensu je la tradukoj de kantoj kaj arioj, kiujn oni aŭdis dum la kongreso.

Organizaj aferoj Kontraŭe al la pasinta jaro inter la kunlaborantaj funkcioj okazis relative multaj ŝanĝoj, la plej grava en la estraro mem. Eksiĝis el la estraro laŭ propra deziro post 10jara intensa kunlaboro la redaktoro de la Bulteno, kol. Barnickel, kiun anstataŭis kol. Graß (Solingen) ek de 1. 1. 67 kiel redaktoro kaj ek de la 19a IFEF-kongreso kiel IFEF-komitatano. Krome ŝanĝis du komisiitoj por specialaj taskoj, nome la kasisto kol. Denk, kies posteulo ek de 1. 10. 67 fariĝis kol. Jentsch (Darmstadt), dum la taskoj „distribuo de Bultenoj/LIF“ resp. „kolektado de revuoj kaj administrado de la centra biblioteko“ transiris el la manoj de kol. Schiermann en tiujn de kol. Schindler (Schwelm) resp. Rösemann (Osnabrück). La distriktkomisiito por Mainz, kol. Ritthaler, tute forlasis sian ĝisnunan profesion por fariĝi instruisto. Lin sekvis kol. Hans (Neustadt/Weinstr.). En Nürnberg transdonis la gvidadon por emeritiĝo kol. Gößmann al kol. Müller (Lichtenfels). Varman dankon al ĉiuj, kiu dum ofte longaj jaroj fidele plenumis siajn laborojn kaj tiel helpis en la gvidado de GEFA. Sed koran dankon same al tiuj, kiuj disdonis sin kiel anstataŭantojn. Kun ili ni iros en la estonteco.

Funebre ni devas komuniki, ke en novembro 1966 **mortis** nia fidela membro Gerhard Schneider nur 39jaraĝa. Krome forpasis niaj longjaraj membroj: Zöllner, Osnabrück (dum la IFEF-kongreso); Gramer, Coburg; Seberl, Bretten; Tschudy, Schaffhausen kaj Schießl, BA Kempten. Ili restos en nia memoro.

Per speciala **varbkampanjo**, kuplita kun valoraj premioj, ni provis plialtigi la membronombron. Kvankam tiu kampanjo donis 97 novajn membrojn, la entreprenado estis komplete nekontentiga, ĉar nur tri procentoj el nia membraro partoprenis. Restos do unu el la plej urĝaj kaj daŭre urĝaj taskoj por la estonteco, alkonduki freŝan sangon al nia asocio.

Ni akcentu ankoraŭ, ke oni fondis novan grupon en Laüppheim.

La GEFA-estraro reciprokis la ĉeeston de GDBA-estrarano en Fulda dum la Sindikata Tago de GDBA en Karlsruhe.

Ni finu ĉiu tiun tre modestan raporton konstatante, ke ĝuste dum ĉi tiu jaro ni sukcesis pli firme ligi la kontaktojn al FISAIC. Tio aparte montrigis dum la kongreso en Fulda, dum kiu la FISAIC-prezidanto, d-ro Schlesser, transdonis medalojn al 3 meritplenaj esperantistoj, kio okazis la unuan fojon. kompilis J. Gießner prezidanto

Nova kasisto de GEFA

„Ĉio fluadas“ — jen verbo validanta ankaŭ por GEFA. Sciiginte en Bulteno 1/67 la ŝanĝon de la redaktoroj, ni nun devas anonci al niaj membraro kaj eksterlandaj amikoj, ke la longjara kasisto, s-ano Otto-Friedrich Denk, transdonis sian oficon en pli junajn manojn. Kiel ni jam skribis en Bulteno 6/65, kiam li estis festinta sian 65an naskiĝtagon, nia longdaŭra, maljuna kaj tamen juna kunlaborinto estas vivanta ekzemplo por tio, ke la okupado pri Esperanto konservas la junecon. Ĉefe ne estas la aĝo, kiu forigas lin de ĉi tiu kasista ofico. Sed la multflankeco de liaj sennombraj ŝatokupoj devigas lin, almenaŭ iom limigi sin, des pli, ĉar li apartenas al tiuj bedaŭrindaj emerituloj, kiuj eĉ ne plu povas havigi al si feriojn. Ni do ankaŭ ĉi-okaze kaj ankoraŭfoje sincere dankas — same nome de la BSW-ĉefestraro — al nia ĉiam afabla kaj ridanta kolego Denk, kiu dum pli ol dek jaroj administris la financojn de nia asocio. Ni certe ne eraras

esperante, ke li ankoraŭ ofte estos videbla en la estontaj aranĝaĵoj de GEFA kaj IFEF, tiam sen laboro, sed inter malnovaj amikoj.



Transprenos la respondeclan taskon alia kolego, kiu intertempe sub plej komplikaj cirkonstancoj sukcese provis sian planan taŭgecon por posteno de asocia kasisto. Jen la konata LKK-kasisto de la 19a IFEF-kongreso, kolego Kurt Jentsch, kiu deklaris sin preta, fariĝi nova kasisto. Ni kore bonvenigas lin en la vico de niaj plej intimaj kunlaborantoj, ne dubante, ke evoluigos frukto-dona, amikeca agado komuna kaj dankante kolegon Jentsch pro lia afabla helpemo.*

Giessner Prezidanto

Aus der Gruppenarbeit

Wuppertal

Ungar bei der Schwelmer Esperantogruppe zu Gast

Am 18. 9. 1967 führte das Mitglied der Eisenbahner-Esperantogruppe Budapest Arpad Szegedi vor Mitgliedern der Esperantogruppen Wuppertal und Schwelm und deren Gästen und Angehörigen Zauberkunststücke vor. Die Zuschauer waren begeistert von den ausgezeichneten Tricks, die Szegedi vollendet beherrschte. Bereits beim Bayerischen Esperanto-Treffen in Augsburg hatte er den herzlichen Beifall der Kongreßteilnehmer für seine Darbietungen geerntet; seitdem besuchte er verschiedene Gruppen des In- und Auslandes. Nach 1945 hat er bereits 15 Länder, unter anderem auch Japan, besucht. Mit seiner Kunst erfreute er mit besonderer Vorliebe die Insassen von Altersheimen und Krankenhäusern. Für die Schwelmer Gruppe war dies seit

Mai d. J. der 5. Besuch eines ungarischen Eisenbahner-Esperantisten.

Kurse für Anfänger und Fortgeschrittene

Nach einer fast ganzseitigen Veröffentlichung im Amtsblatt und mit Hinweisen in 15 Tageszeitungen begannen im September in Düsseldorf, Hagen und Schwerte neue Kurse. Nachdem bereits mehrfach die Volkshochschule Schwelm Esperanto in ihr Programm aufgenommen hat, konnte erstmals ein Kursus bei der VH Opladen in das Programm aufgenommen werden. Die Tageszeitungen haben teilweise in hervorragender Weise über die Kurse und über die Bedeutung der Weltsprache Esperanto berichtet.

Esperanto-Sprachkurs in einer Tageszeitung

Erstmals hat sich eine Tageszeitung unseres Bezirks bereit erklärt

Cefkunveno de la Sindikato de germanaj fervojoj ofiĉistoj kaj aspirantoj (GDBA)

Laŭ invito de la ĉefestraro de GDBA partoprenis membroj de la GEFA-estraro en la ĉefkunveno de GDBA en Karlsruhe, i. a. en la oficiala malfermo. Precipe interesa estis la diskutado dum trafikpolitika forumo, kiu okazis ĝuste kelkajn horojn post diskonigo de la nova plano de la germana trafikministro Leber. Diskutis gravaj reprezentantoj el scienco, ekonomio, partioj, ĵurnalistaro, DB kaj la unua prezidanto de GDBA. Estis por GEFA agrabla okazo reciproki la partoprenon de GDBA-estrarano en la 19a IFEF-kongreso.

Se la okulo ne estus suna, la suno ne povus ĝin ekvidi; Kuŝus en ni ne Di-forto propra, ĉu diosimila povus nin ravi? trad. E. K.

Ni funebras

Kun malĝojo en la koro ni devas sciigi, ke nia kolego kaj samideano, s-ro Paul Schiefl, BOI, BA Kempten (A), 54 jaraĝa, mortis je la 23an de aŭgusto 1967 en malsano en Kempten. Sch. estis iama distriktkomisiito por Augsburg. GEFA neniam forgesos lin! GEFA

einen Sprachkurs für Anfänger zu veröffentlichen. Da in der Vergangenheit bereits im Bulteno der Österreichischen Eisenbahner-Esperantisten und vor einigen Jahren auch in einer deutschen Eisenbahner-Fachzeitschrift derartige Lehrgänge veröffentlicht wurden, bitten wir die Leser dieser Mitteilung uns, soweit vorhanden, derartige Sammlungen für kurze Zeit zur Verfügung zu stellen. Wir bitten Sie, sich diesbezüglich mit dem Bezirksbeauftragten in Wuppertal in Verbindung zu setzen. Auch Hinweise über etwaige Quellenangaben sind erwünscht.

Essen

Die Rheinisch-Westfälische Auslands-gesellschaft in Dortmund, 46 Dortmund, Bornstr. 1, Fritz-Henßler-Haus, veranstaltet ab 4. 9. 1967, jeweils montags ab 18 Uhr, Esperanto-Übungsabende.

*) Basa-telefono: 9 55/8 66/11 24 - BA Darmstadt

Bavara Esperantotago en Augsburg

Dum la semajfino 2a/3a de septembro okazis en Augsburg Bavara Esperantorenkontiĝo. Iniciintoj kaj organizintoj estis niaj fidelaj membroj, la geedzoj Margarete kaj Hermann Schmid. Partoprenis 145 esperantistoj, inter ili gastoj el Francio, Belgio, Nederlando, Svedio, Hungario, Japanio kaj Nov Zeelando. Estis ĝojiga fakto, ke ĉeestis multaj fervojistoj. Eĉ la prezidanto de IFEF, s-ro de Jong, ne timis la longan vojaĝon de Amsterdam al Augsburg por honorigi pere de sia ĉeesto la geamikojn Schmid. Kiel reprezentantino de GEFA partoprenis la sekretariino, S-ino Kruse.

Forlasinte la stacidomon, oni jam spertis la zorgemon de la organizintoj. Bone videblaj ŝildoj tuj ebligis trovi la ĝustan vojon al la sindikata domo. La vetero estis bonega, preskaŭ iom tro varma por longa promenado. Iom da dubo regis pro la nombro de partoprenantoj dum la blo orkestra prezentado sur la urbdoma placo. Sed tiu tuj ma aperis, kiam oni konstatis la plenplenan belan salonon en la

urbodomo. Simpatia urbestro salutis la ĉeestantojn. Inter ili estis minimume 25 honoraj gastoj de urbaj instancoj, ekleziaj eminentuloj, politikistoj, sindikatestroj kaj ĵurnalistoj. La festparoladon pri la evoluo de la lingvo Esperanto dum 80 jaroj faris en germana lingvo la Prezidanto de GEFA, D-ro Werner Bormann, Hamburg. Laŭsajne li bone sukcesis interesigi la gastojn. Dum la posta gazetarkonferenco la ĵurnalistoj montris favoron. La saman oni konstatis je radio kaj televido. Unu ĵurnalisto eĉ restis la tutan vesperon por konvinkiĝi pri la taŭgeco de nia lingvo.

S-ino Wiesmann el Grafenau denove ravis nin per belvoĉa kantado de operaj melodioj, dum F-ino Braun el Laüpheim prezentis en ĉarma maniero modkantojn. S-ro von der Ley bonege sukcesis instrui „siajn“ infanojn. Kurage la etuloj prezentis kantojn, poemojn kaj skeĉojn. Imitinda ekzemplo! Kion diri pri la sorĉisto, S-ro Szegedi el Hungario? Ni ja vidis lin dum la IFEF-kongreso en Bu-

dapeŝto kaj ne miris, ke li sukcesis tute lerte kaj perfekte trompi la ĉeestantojn. Pli poste li bonhumore faris germanlingve vortuldon: „Ich bin ein Schwindler und gehe nun zu Herrn Schindler.“ Per dancado finiĝis la sabato.

Ankaŭ dimanĉon la vetero estis bonega. La mateno komenciĝis per evangelia kaj katolika diservoj. La infanoj faris aŭtobusekskurson al la miniatura urbo Haünstetten. Dum tiu tempo la plenkreskuloj aŭdis prelegon de GEJ-prezidinto Michael Zeilinger. Du Fiat-filmoj kaj unu pri Nov Zeelando estis prezentataj, same diapozitivaj pri Nov Zeelando kun klarigaj vortoj de s-ino Wilson el Wanganui.

Post la tagmanĝo okazis diskuto pri kelkaj demandoj, sed ili ne estas gravaj por niaj legantoj. Grava por ni fervojistoj estas la fakto, ke niaj geamikoj Schmid per entuziasmo, idealismo kaj laboremo sukcesis interesigi vastajn rondojn kaj oficialajn personojn pri Esperanto. Pro tio ni estu dankaj al ili. E.K.

200 staciestroj en Brugge/Belgio.

En Brugge okazis la 23an kaj 24an de septembro 1967 la 4a Internacia Kongreso de eŭropaj staciestroj. Partoprenis preskaŭ 200 staciestroj el 6 landoj. La komitato elektis s-ron Schuermans el Muizen (Belgio). La nova prezidanto estas por Esperanto, sed bedaŭrinde ĝis nun li ne vizitis Esperanto-kongresojn kaj povis pruvi la taŭgecon de Esperanto pro internaciaj aferoj. Pro tio la alparolado estis farata en la nederlanda, franca, kaj germana lingvoj. La sekretario de la internacia estraro, s-ro Delivron el Gandrange Amneville (Francio) antaŭlegis la jarraporton en franca lingvo. La tekston ricevis ĉiuj partoprenantoj redaktata en naciaj lingvoj. La referato pri la „Publikaj

Rilatoj“ fare de s-ro de Smet, ĉe inĝeniero de SNCB sekvis en nederlandan kaj francan lingvojn. La sekvonta kongreso en 1968 okazos en la mapudeco de la lago de Garda (Italujo). Ni esperas Esperanto estos uzata de multaj personoj estontece.

Kurz aber wichtig

Um die Arbeit der Bezirksbeauftragten zu erleichtern, werden die GEFA-Mitglieder gebeten den Jahresbeitrag 1968 in Höhe von DM 3,50 in den ersten Januartagen an die aufgegebenen Konten zu überweisen (soweit dies nicht im Hebelistenverfahren geschieht). Teilen Sie bitte Ihrem Bezirksbeauftragten jeweils Änderungen Ihrer Dienstbezeichnung, Ihrer Dienststelle und Ihres Wohnsitzes mit, damit Ihnen

die Mitteilungsblätter pünktlich zugestellt werden können.

Wir lesen in

Heroldo de Esperanto vom 1.7. 1967 einen ausführlichen Bericht über den 19. IFEF-Kongreß aus der Feder von W. Barnickel unter den Überschriften: „430 fervojistoj el 20 landoj“ und „La metodoj de aŭtomata trajnfluo studitaj en Fulda“.

Das Mitteilungsblatt des BSW der BD Hannover bringt einen Bericht über die Jubiläumsausstellung der BSG im BSW Hannover, die vom 3. — 4. 6. 1967 in der Weserbergland-Festhalle in Hameln gezeigt wurde. Für seine Esperanto-Motivsammlung errang unser Mitglied Herr Heimlich, Bm Soltau, eine Bronze-Medaille. Herzlichen Glückwunsch hierzu. GEFA-Vorstand

Ni legas en

Bulteno de la Austria federacio Esperantista fervojista. La tradiciaj „Internaciaj fervojistaj Esperanto-skisemajnoj“ 1968 okazos de la 10a ĝis la 17a de februaro 1968 en la proksimeco de Innsbruck, kie okazis la olimpikaj ludoj 1960. Informoj kontraŭ respondkuponon donas la organizanto: Johann Geroldinger, Marcusgang 7, A 4020 Linz, Aŭstrio.

Dem Ehrenpräsidenten, Hofrat Hugo Steiner, wurde am 16. 6. 1967 für die Gründung des Esperanto-Museums vor 40 Jahren die „Ehrenmedaille der Bundeshauptstadt Wien in Silber“ verliehen. Die Vereinigung der Bibliothekare Österreichs ehrten HR Steiner, der am 26. 2. 1968 neunzig Jahre alt wird, mit der „Dr.-Josef-Bick-Ehrenmedaille“.

Aus Ungarn wird gemeldet, daß das Organ der ungarischen Bahnärzte „Vasútegészségügy“ allen Artikeln eine Zusammenfassung in Esperanto beifügt.

Diversaĵoj

11a Internacia seminario okazos de la 27a de decembro 1967 ĝis la 3a de januaro 1968 en la universitata urbo Würzburg. La temo de tiu ĉi dua seminario en la ses-parta serio pri „Esencaj trajtoj de la hodiaŭa mondo estos Religioj kaj filozofio en la 20a jarcento“. Samtempe okazos „seminarieto por junular-gvidantoj“ kaj internacia ekzameno. Pluaj informoj per: Sekretario de la kostanta komitato, s-ro Uwe Joachim Moritz, Hafenstr. 75, Münster/Vestfaliao.

UEA-informoj

En la fino de 1966 la Asocio havis entute 3475 delegitojn en ĉiuj kategorioj. El ili estis 1372 delegitoj, 262 vic-delegitoj, 1774 fakdelegitoj kaj 67 junulardelegitoj. Se vi ankaŭ volas esti delegito petu delegit-respondilon ĉe la ĉefdelegito Reinhard Hauptenthal, 6603 Sulzbach 1, am Bahndamm 12.

Ankaŭ la lastaj vaporlokomotivoj nun ricevos „Indusi“.

Por plialtigi la sekurecon Komutprogramo devas esti finita 1967.

Por plialtigi la sekurecon, la Germana Federacia Fervojo ĉiuj vaporlokomotivoj, kiuj ankoraŭ funkcias dum pli longa tempo kaj ĉefe trafikos sur ĉeflinioj, instaligos per Indusi (induktomagnetna trajninfliuo). Parton de la necesaj trafikinstaladoj oni povas gajni el lokomotivoj, kiuj jam estas eksigitaj. La komutprogramo por la vaporlokomotivoj devas esti finita antaŭ la jarkon 1967.

Cis tiom ankoraŭ 445 vaporlokomotivoj, el tio 79 de la konstruserio 44, 300 de la serio 50, 11 de la serio 38, 34 de la serio 64, 7 de la serio 65 kaj 14 de la serio 78 ricevos Indusi. Ĉi tiu sekurecistemo gardas la laŭregulan veturmanieron de la lokomotivisto antaŭ „halt“ montrantan signalon kaj enkondukos devigan bremsadon, se la trajno ne sufiĉe forte bremsas kaj ne haltigas antaŭ la signalo.

El „Rad und Schiene“ trad. E. K.

Nova eldonajo. Aperis kaj estas tuj liverebla „Kolora Floralendaro 1968“ en formato 29 x 30 cm; dorso de ĉiu folio estas detala dulingva priskribo. Prezo, inkluzive de sendkostoj: 2 ekzempleroj 4,50 GM (pluaj rabato). Mendojn al: Esperanto-Rondo Gechingen ĉe Stuttgart.


Anoncoj

Francujo. S-ro Alain Berthy, 5 Grande rue, 35 L'Hermitage deziras korespondi kun germana esperantisto por plibonigi la lingvoscion kaj informi sin pri Germanujo. Li estas dudekunu jaro kaj laboras kiel fervojisto en la fako tirado. Hermitage estas urbeto proksime de Rennes, ĉefurbo de la Bretagne, en la okcidento de Francujo. Li ŝatus korespondi kun fervojisto en malgranda urbo en montaro.

Pollando. Stanislaw Szkop el Jelenia Góra 1, Skrytka poczt 221 deziras korespondi kun la tuta mondo. Li estas 28 jara kaj havas intereson por psikologio, religioscio kaj kolektado de bildkartojn kaj Esperanto-revuojn.

Bulgario. F-ino Penka Dostina, ul. „Anton Ivanov“-18 el Peŝtera deziras korespondi kun germanaj esperantistoj. Si estas ekonomistino en ŝufabriko.

La nombro de la dumvivaj membroj de UEA kreskis de 576 al 667. Dumviva membro pagas por la tuta vivo per unu fojo nur 10-oble la kotizon de membro-abonanto, sendepende de eventualaj postaj kotizaltigoj.



Al niaj membroj kaj eksterlandaj geamikoj ni deziras gojigan kristnaskon kaj sukcesplenan Novan Jaron Germana Esperanto Fervojista Asocio

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main).
Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 565 Solingen-Ohligs, Meteorstraße 13. Druck /
preso: Fränkische Verlagsanstalt und Buchdruckerei GmbH., 8500 Nürnberg. Der Bezug
ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.